

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc - Roussillon »

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN ☎ 34.22.18

JARA ABONO : 9 F

C.C.P. 956-28 Montpellier

2-a Kvaronjaro 1979

N° 71

FEDERACIA KONGRESO en Montpellier

La 31-an de marto kaj 1-an de aprilo 1979, nia federacia kongreso okazis en Montpellier ĉe la protestanta instituto pri teologio.

Ariĝis kvindeko da gesamideanoj kutimantaj ĉeesti en niaj federaciaj kunvenoj aŭ unuafoje venintaj.

Jam de tri jaroj nia kongreso okazas dum du tagoj kio ebligas pli allogan programon.

Ĉi-jare ni havis la apartan plezuron akcepti Renée Triolle, ĝenerala sekretario de U.F.E., kiu partoprenis en ĉiuj eroj de la kongreso.

Sabaton, je la 16-a S-ro Llech-Walter salutis la ĉeestantojn kaj, recenzante la kvar lastajn kajerojn de "Sudfrancia Stelo", donis superrigardon pri la agado en la sinodo de la federacio dum la pasinta jaro.

D-ino Vierne raportetis pri sia vizito ĉe la nacia Esperanto-muzeo en Gray kaj instigis, ke ĉiajn superfluaĵojn oni disponigu al ĝi.

Ŝi krome rediris, ke ni povas senpage anonci en la langvedoka semajna ĵurnalo "SUD". Tiun senpagan servon oni povas (por ne diri devas) do uzi por peti aŭ proponi per-aŭ poresperantajn servojn.

Venis diskuto enkondukita de S-ro Hénin pri la aperonta revuo de Stefam Maul, "Semajno". Aboni, se ne unuope, estas la necesa rimedo por ke finfine povu naskiĝi tiu bezonata semajna revuo, kiu sin volas, laŭ la tipo de la francaj "l'Express", "le Nouvel Observateur" k.m.a. diverslingvaj (reklamo ne pagita!) informfokuson en esperanto pri la plej diversaj kaj gravaj temoj de la nuntempa vivo.

Sekvis intersaĝoj de ideoj pri ĉies necesa kunlaborado por nia poresperanta agado. Ĉiu, je sia nivelo kaj laŭ specifa eblo kaj kapablo, povas alporti, sub plej varia formo, eĉ se ŝajne bagatela, sian kontribuon al komuna laboro.

S-ro Raynaud invitis la ĉeestantojn partopreni en la jarekskurso de la Gard-departementa federacio. Ĉi-jare ĝi okazos en Villeneuve-lès-Avignon, la 24-an de majo.

S-ino Volpelière levis demandon pri traduko de "Roussillon". Ĉu vere taŭgas "Rusiljono" laŭ P.I.V. ? Ĉu ne pli bona estus "Rusijono"? Same por "Languedoc". Ĉu "Langvedoko" estas pli ĝusta ol "Langedoko" aŭ "Lingvodokio" ? S-ino Volpelière estas komisiita sin turni al P-ro Waringhien por respondo al tiu demando, samtempe lin petante ĉu de tempo al tempo ne eblus antaŭvidi suplementon al la dudirekta franca-esperanta vortaro pro enkonduko de novaj teknikaj terminologioj kaj neologismoj.

Renée Triolle repetis, ke la esperantistoj ne preterlasu la eblecon sin enskribi en la flavajn foliojn de la telefonlibro sub la rubriko "Professeur de langues".

S-ro Volpelière atentigis pri kelkfojaj eraroj en "Revue Française d'Esperanto". Plej ofte tio okazas je la presado sed, pli ĝena ĉefe por komencantoj estas misuzo de vortoj.

Estas planata, ke la venontjara kongreso de U.F.E. okazos je Pentekosto en Bruselo (do temas pri "eŭropa E-kongreso") kaj nia federacia kongreso eble okazos en Mende. Dume nia ĉi-jara aŭtuna federacia laborokunsido okazos en SETE, la 23-an de septembro, kiu estas la lasta tago de la "Mediterranea E-semajno" pri kiu volonte informas D-ino Vierne.

.... /

...../.....

Ni preparis kaj aprobis tekston por la nacia kongreso en LILLE. Ĝi troviĝas post tiu ĉi protokolo.

Post rapida sinprezento de la grupoj (1) finiĝis tiu unua laborkunsido.

Je la vespermanĝo aldoniĝis al ni D-ro Albault, Prezidinto de U.F.E. kaj ano de la Akademio de Esperanto kaj lia fratino Odette, ano de la komitato de U.F.E.

Interesa distra vespero rekunigis la gekongresanojn, kiuj kun intereso ĝuis gitaran kaj violonĉelan muzikaĵojn fare de junuloj, projekciom de komentitaj diapozitivoj pri la 48-a universala kongreson kaj interesan vojaĝon tra Bulgario kaj fine prezenton de la nova serio da informcelaj lumbildoj tra celtrafaj por neesperantista publiko. Pri tiu ĉi lasta bonega propagandilaro informas kaj disponigas S-ro Lentaigne.

Dimanĉon, je la 9 h 15 malfermiĝis la dua kongresa laborkunsido.

Ĉar nia financa situacio prezentita de S-ino Négrom (detalojn ni trovas aliloke en tiu S.F.S.) estas iom profitata, ni decidis donaci 200,00 F al UFE:

- 100,00 F por la fonduso-domo 2
- 100,00 F por la varbado-komisiono.

Vakis 5 postenoj en la sino de la federacia komitato. S-ro Pelletier ne rekandidatiĝis tiel volante ebligi la eniron de reprezentanto de Lozerio. Dankoĵa al S-ro Pelletier pro lia ĝisnuna partopreno kaj delikata propono. Dankoĵa ankaŭ al S-ro Hénin kiu akceptis enviciĝi en la komitato. Estas do reelektitaj kaj elektita S-roj Frus, LLech-Walter, Raynaud, D-ino Vierne kaj S-ro Hénin.

S-ino Volpelière invitis la ĉeestantojn partopreni en la mondociivana kongreso kiu okazos, en aŭgusto, en La Lambertie apud Bordojo.

La rezultoj de niaj decidoj kaj voĉdonado necesaj por la kongreso de U.F.E. troviĝas je la fino de tiu protokolo.

Tiel finiĝis la laborparto de nia kongreso.

Je la 10-a ni veturis al la inaŭgurota Zamenhof-strato (fakte bulvaroj) Tre multnombro ĉeestata de esperantistoj kaj simpatiantoj, tiu inaŭguro estis honorigata de deputito, departementa konsiliano kaj reprezentanto de la unbestro, S-ro LLech-Walter, Renée Triolle kaj juna esperantistino deklamis "La Vojo" de Zamenhof.

Post la tagmanĝo kelkaj interesitoj rekunigis por paroli pri la statut-sanĝo de U.E.A. D-ro Albault enkondukis la debaton. Ĉiu, kiu deziris, donis sian opinion, sed, ĉar tiu temo ne apartenis al la aprobita tagordo kaj ĉar jam finita estis la kongreso, tiu inter-sanĝo de ideoj restis nur informcela.

J.A.

(1) notindas, ke en 1978, la grupo de Nîmes havis 16 aktivajn membrojn de U.F.E. kaj tiu de Montpellier 13.

-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-!-

Informoj necesaj por la Nacia Kongreso de U.F.E. en LILLE

FEDERACIA KONGRESO EN MONTPELLIER (31.03 / 1.04.1979)

Reprezentanto de la Federacio en Lille : S-ro LLECH-WALTER

Rezolucio :

La kongreso de la Federacio Langvedoko-Rusiljono okazinta en Montpellier :

1°/. - Sincere gratulas la estraron de U.F.E. kaj la varbado-komisionon pro la farita laboro ;

2°/. - Sugestas, ke kadre kun la elekto de la Eŭropa Parlamento la esperantistoj unuope rilatu kun la kandidatoj petante ilian sintenon kaj pretecon pri esperanto.

Voĉdonado pri la agado de U.F.E.

Rajtis voĉdoni : 46

Voĉdonis : 27

Validaj voĉdoniloj : 27 (nur kelkaj respondoj estis nevalidaj)

Rezulto

	<u>Jes</u>	<u>Ne</u>	<u>Sindeteno</u>	<u>Nevalida</u>
Agadraporto 1977/1978	24	0	0	3
Financa raporto 1977/1978	24	0	0	3
Buĝeto 1979	24	0	0	3

Renovigo de triono de la komitato :

	<u>Aproboj</u>	<u>Malaproboj</u>	<u>Sindetenoj</u>
Bourot	27	0	0
Bachelier	27	0	0
Debertonne	27	0	0
Despiney	26	1	0
Liouville	27	0	0
Rousseau	27	0	0
Royer	27	0	0
Törtel	23	4	0

Statutŝanĝoj (U.F.E.)

	<u>Aproboj</u>	<u>Malaproboj</u>	<u>Sindetenoj</u>	<u>Nevalidaj</u>
Artikolo 1	22	3	1	1
" 2	23	3	0	1
" 3	23	3	0	1
" 4	22	3	1	1
" 5	22	3	1	1
" 13	22	3	1	1
" 17	22	3	1	1
" 19	23	3	0	1

(kontrolis S-roj ENSUQUE, AMOUROUX)

La federacia sekretario,
Jean AMOUROUX

Letero de la nova Prezidanto de UFE

AGAD-PROGRAMO 1979-80

(eltiraĵoj de la alparolo al la dua ĝenerala kunveno -- decidoj prenitaj de la lasta komitata kunsido)

Estimataj gekolegoj,

Nia nacia movado ne naskiĝas, nek ekmoviĝas nur hodiaŭ, sed se oni rigardas la ĵusan estintecon, ĝia granda merito estas trairi malfacilajn jarojn, kaj plu vivi. En la lastaj jardekoj, ĝi perdis pro forpaso multajn elstarajn homojn ĝi perdis pro senesperigo multajn aliajn... sed ĝi plu vivas danko al la kompetenco de sindonemaj samideanoj. Ĉar mi, persone, ege vojaĝis tra nia lando, kaj aŭdis, kaj aŭskultis multajn opiniojn mi volas certigi, ke la homoj al kiuj vi transdonis pere sinsekvaj balotoj la respondecon de la asocio estas indaj je via estimo, kaj fido. Oni devas gratuli, inter ĉi tiuj, tiujn nemalhaveblajn homojn kiuj, nun, post longa periodo profesia donas la tempon de sia emeriteco al ni ĉiuj. Ĉiuj tri-dek, aŭ kvar-dekjaraĵoj nur povas esperi ke niaj spertaj kunlaborantoj plu helpos nin ankoraŭ dum multaj jaroj. Fine sed tute kore, mi volas danki Prezidanton Hervé GONIN kiu, malgraŭ tre malgravaj familiaj malfacilaĵoj, surportis la respondecon de U.F.E. en la lastaj jaroj, kaj kiu konsentis konservi tre pezan, tre laborpostulan postenon apud ni, kiel ĉefredaktoro de nia revuo.

Mi volas resumi, por la legantoj de nia cirkulero, kiuj ne povis veni al la nacia kongreso, kiamaniere ni venis al la proponita agadprogramo.

En la 3 lastaj jaroj la VARBADO-ESPLORADO KOMISIONO sukcesis enlistigi ĉiujn kotizintojn de niaj federacioj, grupoj, fakoj. Ĝi skribis sisteme al

...../.....

multaj kompetentaj homoj por krei alian gravan liston : tiun de la INSTRUAN-
TOJ de la lingvo Esperanto en Francujo. La kreo de nia cirkulero "ŝlosilaj
kluboĵ" estis la rezulto de la ĝenerala konstato, ke ne ekzistas intersanĝoj
inter ĉiuj grupoĵ, kaj instruantoĵ. Ĉiun jaron, ni skribis al la 3000 ne abonan-
toj de nia revuo pere de n° -bis, por ke, malgraŭ ĉio ili aŭdu pri nia agado,
kaj niaj provoj. Plie tio ebligis ĝisdatigi nian adresaron. Jam trifoje ni
kunvenigis inter 15 kaj 20 anoĵn en seminarioĵn ĉe la sideĵo. El tiuj inter-
sanĝoj naskiĝis amaso da ideoĵ utilaj por nia disvolviĝo. Ni kompilis la sumon
de tiuj diversaspektaj spertoĵ, kaj konturiĝis nia plano. Ĝi estis adoptita de
la lasta komitata en Lille.

Dinamikon bezonas la homaj anaroĵ por konstante revigliĝi. La VEKO
proponis enmeti en niaĵ statutotoĵn referencon al Homaj Rajtoĵ.

Tiun dinamikon, ni intence nomas "politiko de la asocio". Tiun vortom
grekdevenan, kelkaj anoĵ ne ŝatas. Ĝi signifas : manieron por regi urbajn, ŝtatajn,
aŭ kial ne, asociajn aferoĵn. Ĝi ankaŭ subkomprenas planon aŭ referen-
con al iu ideo. Dro Zamenhof kiu estis travivinta la mankon de la kontaktoĵ
inter homoj, sian lingvon kreis cele de vera kompleta komunikado inter ĉiuj
etnioĵ, nacioĵ, religianoĵ... Efektive li jam pensis pri tiu INTERNACIA KOMUNI-
KADO, kiun nia generacio finfine pritaksis "HOMA RAJTO". Li volis doni al la
homaro, ne, facilan lingvon, sed facilan komunikilon. Ĉu tio ne estas memvola
elekto, ĉu ne estas politika sinteno, riĉe neutrala politiko, sed, tute ne, nega-
tiva politiko ? Ni ne estas materialista asocio, ni havas nekaŝeblan idealon :
ESPERANTO, RESPONDO AL LA HOMA RAJTO JE KOMUNIKADO, tio estas eble la pleĵ mo-
blan argumento, kiun ni povas uzi ? Ĝi estas nun oficiale en niaĵ statutotoĵ apud
la difino de la lingvo mem.

Tiu argumento donas plian, tre larĝskalame prestiĝon al U.F.E., ĝi mal-
fermas por ni novajn pordoĵn en ĉiuspeciaĵ asocioĵ, ni povas prezenti en ĉiuj
homaj renkonteĵoj, ĉar ni estas la nuraj solvontoj al la lingva komunikadopro-
blemo. Ĝentoj da grupoĵ en Francujo havas strukturoĵn paralelajn al la nia, ofte
pli densajn, sed ofte pretajn por enkonduko de debatoĵ, prelegoĵ, ekspozicioĵ. Ni
iru tien, kie la homoj jam kunestas. Ni vizitu la sideĵojn de tiuj asocioĵ por
profoto eventualajn aŭspicioĵn. Kontaktoĵ estu tuj planitaj de niaĵ gvidantoĵ
en la departementoĵ, regionoĵ, kaj kial ne kvartaloĵ. Tiu "jam selektita klien-
taro" atendas nin. Surloke, multaj plendas pro siaĵ limoj, ni venos por plilar-
ĝigi ilian mondon. Kaj por ni kia sparo da laciĝo, da mono kaj da tempo !

Nun, pri la detaloĵ de nia ambicia programo :

- larĝe reklamĵ pri nia referenco je la Deklaracio de Homaj Rajtoĵ,
- kontakti en la kadro de niaĵ statutotoĵ kun ĉiuj gravaj konataĵ asocioĵ,
- studi kiel helpi niĵ niaĵ neprofesiaĵ instruantoĵn (160 el 180 proks.)
- flegi niaĵn pleĵ bonajn lernantoĵn ~~XX~~
Zamenhof-Tagoĵ por renovigi niaĵn estraroĵn,
- surreligi du grandajn kampanjoĵn ĉiujare (aŭtunan de septembro ĝis la Zamen-
hof-Tago, celo : novajn anoĵn --- printempan : antaŭ kaj post la nacia kongre-
so, celo : rekapti la malnovajn membroĵn, ĉefe, la izoluloĵn),
- relanĉi la eldonopovon de nia asocio (vidu poste nian novan propagandilon),
- perfektigi la strukturon de la asocioĵ por ke la bonaj rezultoj de kelkaj
helpu al la aliaĵ, kaj faru tiel-ĉi nian propagandon pli efika,
- instigi la izoluloĵn al kreo de novaj kursoĵ, kaj novaj grupoĵ per taŭgaj
rimedoj,
- serĉi financaĵn rimedojn por la reklamaj kampanjoĵ,
- modernigi rapide nian revuon, ĝin pliriĉigi kaj disvastigi,
- plioftigi la rilatoĵn kun la aliaĵ asocioĵ,
- doni al la naciaĵ kongresoj pli pozitivajn reklam-kaj laboreblecoĵn,
- modernigi la sideĵon kaj la sekretariaton.

Pri la nova propagandilo, kies nomo estos " APPROCHE DE LA LANGUE
INTERNATIONALE", la leganto de "ŝlosilaj kluboĵ" jam scias pri ĝi. La sukceso
de ĝia prezento al la kongresistoj estis granda. Jam ni ricevis mendon de
3000 ekzempleroĵn.

Koncerne la mendoĵn faritajn ĉe la kongreso, ni havis specialan ta-
rifon (ĝi plu validos por niaĵ legantoĵ ĝis la 25-a de majo):

	kongrestarifo	normala tarifo
por 1000 , unu kostas	2 F	2,50 F + sendokostoj
por 500	2,50 F	3 F "
por 100	3 F	3,50 F "

La sidejo vendos la libron 5 F + sendkostoj

Reklamoj estas fareblaj en la libreto (formato de la libreto 15 x 10)
Duonpaĝo kostos 350 F ; koverta duonpaĝo 450 F .

Se ni ricevos rapide mendon de 2000 aliaj ekzemplaroj, la presado okazos antaŭ la 15-a de Julio. Nepre mendu tuj, vi povas antaŭpagi per 25% sumo.

Punkta agado : la nova komitato de U.F.E. dividis oficiale la respondeciojn de laboro laŭ la spertoj de la homoj. Vi povas konsideri, ek de nun, ke nia sekretariato facile transdonos viajn petojn. Jen la listo de la servoj : Ĝenerala Sekretario, Amaskomunikado, Argusoservo, Artaj aferoj, Biblioteko, Delegitaro U.E.A., Eksteraj rilatoj, Fakoj, Federacioj, Financoj, Gazetaro, Informado, Junularo, Kongresoj, Komerco-Industrio, Kulturaj aferoj, Libroservo, Publikaj rilatoj, Rebatservo, Rilatoj kun Katolikoj, Protestantoj, k. t. p. . . ., Sidejo, Turismo, Var-

Ni legos tre plezure viajn komentojn pri nia laborprogramo, kaj kompreneble informos regule ĉiujn U.F.E.-servojn pri ili.

Tre sincere, kaj samcele via

Jean-Louis TEXIER

Prézidanto de U.F.E.



La originoj de la Sardano

(Ni prezentas la finon de la interesa artikolo de nia Prezidanto René LLECH-WALTER kies jam du paĝojn vi povis legi en la 68-a kaj 70-a numeroj de nia revuo...)

En la franca Katalunio la sardano estis preskaŭ malaperinta dum la lasta duono de la pasinta jarcento, escepte de la regiono Vallespir. La "Renaiŝenco" sudpirenea preskaŭ ne eĥis trans la montaro. Tamen, politika faktoro eble kontribuis al la rapidega renaskiĝo de la sardano en la franca Katalunio. Je la fino de la hispana civila milito, e, 1939, kelkaj miloj da hispanaj katalunoj elmigris al Rusiljono. Tamen, la eksplodo de la dua mondmilito ne favoris, kompreneble, la folkloram aktivecon de tiuj sudkatalunoj en la franca Katalunio invadita. Sed tuj post la liberigo de Rusiljono, kelkaj elmigrintoj sudkatalunaj kaj kalkaj rusiljonaj entuziasmuloj de la kataluna tradicio, sukcesis renaskigi la entuziasmon por tiu bela danco. De 1946 ĝis niaj tagoj la sardano populariĝis eksterordinare en Rusiljono, kaj nun en ĉiuj vilaĝoj kaj kompreneble ankaŭ en la ĉefurbo Perpignan, ĝi estas tre ofte dancata. Ankaŭ en la hispana Katalunio la sardano, post la parentezo trudita de la politikaj cirkonstancoj, ree disvastiĝis, kaj nun oni dancas ĝin publike eĉ en la hispana ĉefurbo Madrido.

Paralele al la ĝenerala emo al tiu danco populariĝis ĉie ties muziko. La modernaj longdaŭraj diskoj disvastigis ĝin ĉien. Aldone mi devas diri, ke en tiu senco, multaj katalunaj literaturistoj verkis la parolojn, por ke la sardanoj ankaŭ estu kanteblaj.

Kiel ekzemplo de mia antaŭa aserto pri la alta kvalito de la sardana muziko, mi rakontos jenan anekdoton. Antaŭnelonge, en unu teatro de Madrido (teatro de la Zarzuela), oni prezentis klasikan hispanan operon "Marina", de la komponisto Arrieta. La agado okazas en la kataluna regiono, kaj la direkto de la teatro, kun la intenco doni al tiu prezentado ankoraŭ pli regionan etoson, enmetis tiun belegan sardanon pri kiu mi jam parolis, "La Sankta Domo", de Morera. La muzikon ludis la simfonia orkestro de la teatro, kaj dancis ĝin fama baleta trupo. Oni ne hezitis enkonduki fremdan muzikpecon, ĉar ties muzika strukturo tute ne malharmoniiis kun la partituro de la opero. La sukceso de tiu eksperimento estis eksterordinara.

La originoj de la Sardano

- 6 -

Alia fakto ankaŭ pruvas tiun altan kvaliton de la sardana muziko. Eminenta muzikisto kataluna, Paŭlo Casals, tutmonda konata violonĉelisto, ankaŭ komponis kelkajn muzikajn verkojn. En tiuj verkoj li uzis la sardanan ritmon sesfoje. Inter tiuj verkoj de Casals estas tre menciinda lia "Sardano por violonĉeloj", komponita por orkestro kun 32 el tiuj instrumentoj. Tamen ĝi estis dufoje ludata en Zŭrich de orkestro kun 120 violonĉeloj.

Alia simfonia poemo de Casals kun sardanaĵ ritmoj estas "Sankt Marti del Canigo", kiu estis ludata en 1950, dum la Muzika Festivalo de Prades, fare de simfonia orkestro en kiu tre elstaraj muzikistoj tutmonde konataj ludis la tipajn katalunajn instrumentojn.

La eminenta pianisto Harold Bauer resumis tiujn kvalitojn de la sardana muziko per tiu ĉi opinio: "Ĉiuj popolaj dancoj, kiam ili estas adaptitaj al simfonia verko, aperas kiel aldonitaĵo, kaj la simfonia teksaĵo estas kvazaŭ vesto kiu kovras ilin. Kontraŭe, la sardano havas per si mem simfonian kvaliton".

Ĝis nun mi parolis pri la historio de la sardano, pri la disvastigo de la danco mem kaj pri la etendiĝanta populareco de ties muziko.

Tamen, kelkfoje la historiaj priskriboj povas fariĝi tedaj. Tial mi volas reliefigi ankaŭ la signifon kaj simbolecon de tiu ĉi danco, kiun la granda poeto Maragall kvalifikis kiel "la plej bela el ĉiuj dancoj ekzistantaj kaj ekzistantaj".

René LLECH-WALTER

(el prelego farita en la Kastelo "Gresillon" - Pasko 1978)



* ANGULO DE LA KASISTO *



La enhavo ja la 1^a de Aprilo 1979 estis :

ĉe la ŝparkaso 1.183,32

ĉe la poŝtkonto 1.523,97

2.707,29

La enhavo je la 1^a de Aprilo 1978 estis :


ĉe la ŝparkaso 1.111,10

ĉe la poŝtkonto 1.586,07

Profito de la kaso 10,12

2.707,29

La detala raporto aperos en la venonta numero... La kasistino petas al el viiom da indulgo!!! Antaŭdankon !!!



Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal : 2^{me} Trimestre 1979

Imp. Générale, 21, rue de la Madeleine, Nimes